## AFRIKAJ SAMIDEANOJ ATENDAS VIN!

RAPIDU ALIĜI AL LA KONFERENCO ĜIS LA **1-a DE MAJO**, ĈAR POR LOĜ-, MANĜ- KAJ EKSKURS- MENDOJ, KIUJ ATINGOS NIN **POST LA 1- a DE MAJO 2008** ONI DEVAS **ALDONE** PAGI **10%** .PRO MALFRUAJ MENDOJ.

# *Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero*

***Kial*** ILEI nun konferencos en Afriko? — estas ofta demando de esperantistoj al estraranoj de ILEI.

Ni havas kelakjn bonajn kaj gravajn kialojn por tio.




— En ajna aranĝo ni vidas malmultajn samideanoj el Afriko, do, venis tempo por pensi pri alternativo kaj ILEI akceptis defion — ni konferencos en Afriko, en Benino, en Portonovo tuj post UK.

— ILEI konferenco en Afriko en la jaro 2008 estas grava evento kaj por Esperanto-movado entute kaj por historio de ILEI kaj por E-movado en Afriko.

— Por omaĝi kaj kuraĝigi lokajn samideanojn, doni instigon al pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi nian lingvon en la tuta mondo.

— Indas ne nur ĉeesti gravan eventon, sed ankaŭ interŝanĝi spertojn kun niaj afrikaj samideanoj, kontribui al disvastiĝo de nia lingvo en la tuta mondo kaj ĉerpi inspiron el ilia entuziasmo.

— Por konatigi lokajn aŭtoritatojn kaj intelektulojn kun esperanto-medio kaj ebligi daŭran kunlaboro de esperantistoj kaj ne esperantistoj ankaŭ en Afriko.

Ĉefa celo de la konferenco estas kontribuo de ILEI al la progreso de Esperanto en Afriko, transdono kaj interŝanĝo de instruspertoj, sed ne malpli gravas ankaŭ profiti interkulturan renkontiĝon inter Afriko kaj aliaj kontinentoj, spertiĝi pri afrika Esperanto-movado, per Esperanto ekhavi kulturajn konojn pri la landoj de la partoprenantoj, enrigardi la ĉiutagan vivon, starigi verajn interhomajn personajn kontaktojn, kiuj kresku al multjara kunlaboro ene de nia movado kaj ekster ĝi.
Pro ĉio ĉi ni ĉiuj devos streĉi niajn fortojn kaj klopodi organizi kelkajn seminariojn, specialajn kaj lingvajn kursojn, ankaŭ organizi seriojn de prelegoj — siaspecan Konferencan Universitaton de ILEI.

## Afriko de proksime —
## ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!

Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike — ni ege petas Vin *subteni* la konferencon per financa helpo kaj subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko per enpagoj al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“. Sed pli bone plenigi **aliĝilon** en http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php kaj partopreni en la unua en historio granda internacia porinstruista E-aranĝo en Afriko. **Informoj** pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php.
Ankau bv. vidi http://ileiweb.extra.hu/portonovo.html— ne neglektu sinceran inviton de lokaj samideanoj!

Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al:

**Aida Čižikaitė** aidute@mail.lt (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj

**Charles Alofa** alofkarlo@yahoo.fr (prezidanto de LKK).

## La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino)

## 29 julio-5 aŭgusto 2008

## BONVENON!